

# LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-  
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE  
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.) och Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

Redakcio: J. LUNDGREN, Hedemora, J. HEL-  
SING, Gävle. Adreso por korespondado: Gävle.  
Ansvarig utgivare — responda eldonanto kaj  
administranto: W. WAHLUND, Gävle, (Svedujo).

N:o 10.  
Oktober 1915.

Prenumerationspris — abonprezo: i Sverige  
1:20 kr., i Norge 1:60 kr., eksterlande 1:— Sm.  
(1:82 kr.).  
Lösnummer 10 öre.  
Annonpris — anonprezo: 5 öre pr mm.

## Vivu la 12:a kongreso!

Esperantokongressen i San Fran-  
cisko har beslutat uttala såsom sin  
önskan, att

## tolfte internationella espe- rantokongressen anordnas i Köpenhamn efter krigets slut.

Jam nun ni proponu, ke la parto-  
prenontoj ĝenerale portu sur brako  
aŭ alimaniere rubandon kun la vortoj:  
NE DISKUTAS POLITIKON!

\* \* \*

**La abonprezo de La Espero**  
estos por 1916 1 kr. 50 öre. Ni  
esperas ke niaj ĝisnunaj abonantoj  
daŭre akcelos nian gazeton malgraŭ  
tiu malgranda prezaltigo.

\* \* \*

**D**en som har La Esperos alla  
årgångar äger därigenom en  
värdefull samling av  
redogörelser för orsakerna till  
Esperantos framgångar,  
uppgifter ur Esperantos historia,  
särskilt för de senaste åren,  
råd och anvisningar för stude-  
randet och användningen av Espe-  
ranto,  
uttalanden av kompetenta per-  
soner ur skilda nationer, samt där-  
jämte  
en ganska omfattande och om-  
växlande samling litteratur på Espe-  
ranto, det erkänt bästa medlet för  
inhämtande av kunskap i detta språk.



## Barnen och Esperanto.

I ett nyligen hållet föredrag tala-  
de en professor i hebreiska om, hu-  
ru det gick till när han omvändes  
till esperantist. Han betraktade es-  
peranto till en början med en god  
portion skepticism och ansåg hela  
rörelsen meningslös, tills han en dag  
fick höra det talas, och talas av en  
liten flicka, som pratade med sin  
mor lika otvunget och naturligt på  
Esperanto som på engelska. Detta  
övertygade honom om, att Esperanto  
var ett »levande språk».

Även i fråga om Esperanto liksom  
i många andra saker, håller det  
gamla yttrandet streck, att  
»ett litet barn skall leda dem»,  
och när man undervisar barn i Es-  
peranto, så ser man, huru värdefulla  
resultat kunna vinnas icke blott hos  
dessa utan även hos andra som få  
höra dem tala.

Jag kommer ihåg ett yttrande av  
en högt uppsatt person, som kritise-  
rade Esperanto. Han antog, att det  
skulle läras åt barnen. Han rygga-  
de tillbaka vid tanken på, att ett  
barn skulle tilltala sin mor med  
»patrino» — en *kvinlig fader!* Han  
undanbad sig att man besudlade  
barnaläppar med Esperanto som med  
något »barbariskt». Jag har hört  
barn tala Esperanto. För mina öron  
lät det som vacker musik..

De som bevistade Antwerpenkon-  
gressen, påminna sig säkert doktor  
Robins två förtjusande barn, som vi-  
sade sig vid späd ålder besitta en  
ingående kunskap i Esperanto. De  
deklamerade, besvarade frågor, och  
visade även på andra sätt att deras  
grepp om Esperanto var lika fast  
som om modersmålet. Dessa barn

hade naturligtvis lärt Esperanto i  
hemmet och icke ur böcker.

En gång när jag reste i Frankrike,  
sammanträffade jag med en yngling  
på sjutton år, som då han på den  
gröna stjärnan jag bar i rockupp-  
slaget såg att jag var esperantist,  
tilltalade mig på Esperanto och frå-  
gade, om han på något sätt kunde  
stå till tjänst. Han talade Esperan-  
to utmärkt, och tillfrågad om ur vil-  
ken lärobok han hade hämtat sin kun-  
skap i språket, svarade han, att han  
aldrig läst någon lärobok eller gått  
genom någon kurs, utan »snappat  
upp» det, då han hörde sin far och  
mor tala det.

För några år sedan meddelade en  
fransk esperantist, att hans 4-års  
pojke var världens yngsta esperan-  
tist. Under det franskan var gos-  
sens modersmål, hade Esperanto va-  
rit hans »fadersmål». Fadern hade  
på inga villkor talat till barnet på  
franska utan alltid på Esperanto, och  
följaktligen hade gossen alltid tillta-  
lat sin far på Esperanto. Flera es-  
perantister ha antagit denna metod.  
Det är någonting heroiskt i den, och  
om icke fakta visa, att offren synas  
njuta av försöket och icke bli sämre  
för det, skulle man hysa en viss tve-  
kan att rekommendera det som en  
regel för esperantistiskt familjeliv.

Det är svårt för en icke-esperan-  
tist att göra klart för sig, vilken  
verkan kunskapen i ett världsspråk  
kan ha på ett barn. Men esperan-  
tister, som sett sina barn växa upp  
med en praktisk kunskap i språket,  
finna att det kommer en tid, då de  
unga upptäcka att de ha ett för-  
eningsband med hela världen, som  
framkallar hos dem en starkare med-  
känsla för hela mänskligheten.

Främmande land och folk bli me-

ra verkliga för dem och de se sina geografi- och historieläxor ur en helt annan synpunkt än andra barn.

När tiden kommer att lära främmande språk, finna de sin uppgift i hög grad förenklad och de äro i stånd att på en gång tränga in i det språks »själ», de lära sig.

I detta hänseende blir Esperanto en uppfostrare av största möjliga värde.

Inom loppet av några år skall en hel mängd belysande erfarenhetsrön ha hopat sig angående resultatet i uppfostringshänseende i fråga om barn, som lärt Esperanto, erfarenheter samlade i alla världens länder, och man kan tryggt påstå, att dessa resultat komma att få ett mäktigt inflytande på skolmyndigheterna, och leda till slutsatsen, att Esperanto förtjänar en plats på varje skolschema, såsom det första språk varje barn har att lära efter sitt modersmål.

W. M. Page

i »The Esperanto Monthly».

Övers. från engelskan av Rpn.



## Om Adjektiven.

Adjektiven äro antingen

1) *attributiva* (angiva redan kända egenskaper) eller

2) *predikativa* (angiva egenskaper, som bekantgöras, eller som bliva följden av en omtalad verksamhet).

Exempel:

- 1) *bela* infano,  
*blanka* papero,  
*Stokholma* strato,  
*norvega* ŝipo,  
*fumanta* viro,  
*mia* mano,  
*la aŭstria* imperiestro;
- 2) *la arbo* estas *alta*,  
*la hundo* estas *fidela*,  
*la avo* estas *maljuna*,  
oni pentras *la domon flava*,  
*la lampo* faras *la ĉambrom luma*.

Adjektiven i Esperanto överensstämma i numerus alltid med sitt substantiv; de attributiva adjektiven antaga ackusativändelse tillsammans med substantivet, men de predikativa stå alltid i nominativ.

Exempel:

- 1) *ni* *svedaj* *urboj* oni ofte trovas *lignajn domojn*,  
*la junu sinjoro* forrazas *sian lanugan barbon*,

*bona komenco* estas *duona* laboro;

2) *la fenestroj* estas *fermitaj*,

*la tigro* estas *kruela*,

*la tigroj* estas *kruelaj*;

1) och 2) oni pentras *la flavan domon blanka* (man målar det gula huset vitt),

*la filo* opinias *la patrinan admonon nebezona* (sonen anser den moderliga förmaningen onödig),

*li* trovis *la pordon fermita* (han fann dörren stängd; men däremot: *li* trovis *la pordon fermitan*, han fann den stängda dörren),

*lavu viajn manojn puraj* (tvätta edra händer rena).

Ordföljden i Esperanto överensstämmer med tankegången hos den talande. Härav följer att adjektivet kan förekomma lika väl framför som efter sitt substantiv, utan att satsens betydelse därigenom undergår någon förändring. Exempel: oni pentras *blanka* *la flavan domon*; *luma* *la lampo* faras *la ĉambrom*; *la filo* opinias *nebezona* *la admonon patrinan*. Vid vårdat tal förtydligas det sagdas betydelse genom särskild betoning av det ord som skall framhållas. Exempel: *fermita* *li* trovis *la pordon* (kiun *li* atendis malfermita); *li* trovis *la pordon fermita* (sed *ĝi* estis malfermita por aliaj personoj); *li* trovis *fermita la pordon* (sed *la fenestroj* ne estis fermitaj).

*Jln.*



## En la apoteko.

— Notu *ĝuste*, kion *mia* edzino havu, kaj kion *la bovino* havu, ĉar estus *granda domaĝo* se mi donus al *la bovino* eraran medikamenton.

\* \* \*

Dum foiro ruza viro skribis sur sian budon: »Esperanton parolanta kanario».

Multaj personoj eniris, kaj ĉiuj revenis ridante. Al demandoj ili respondis: »Jes, jes, *ĝi* parolas».

*La viro* atendis, *ĝis* kiam dek personoj troviĝis en la budo.

Tiam *li* fortiris tukon de la kaĝo kaj demandis al *la birdo*:

— Ĉu vi volas cigaron aŭ pipon?

— Pip' — respondis *la birdo*.

— *La akuzativon* *ĝi* ankoraŭ ne lernis, klarigis *la viro*.

El The Esperanto Monthly.

## La packongreso de la virinoj en Haag,

Aprilo 1915.

De B. J-hss Klingenberg.

### II.

Mia unua artikolo traktis tion, kion mi nomas la senfruktaj klopodoj por la paco kaj al tiuj ĉi estas ĉiam donitaj partipolitikan transfadon. La kvin unuaj rezolucioj kaŭzos por la pacagado pli da malutilo ol utilo.

La dua, »pozitiva» direkto de la pacagado havas la celon, ke la granda maso de la popoloj mem per paeaj, sociaj rimedoj kutimiĝos dum la interpopola paco la justecon kaj moderecon por kaj grandaj kaj malgrandaj nacioj kaj ankaŭ por la primitivaj popoloj. Tiu ĉi kutimiĝo estas farata per prospero kaj faciligo de la komuna laboro de la koncernataj partioj. Laŭ la enhavo de la origine antaŭmetitaj (5) rezolucioj oni estus tentata diri, ke la anoj de tiu ĉi direkto verŝajne ne estis inter la aranĝistoj de la programo, sed ili sin trovas inter la okazaj kongresanoj.

En la apartaĵo »b» oni nome trovos rezolucion, per kiu estas proponita, »ke permanenta konferenco havos regulajn kunvenojn por trakti, — ne la regulojn por milito, — sed praktikajn proponojn, kiuj celas pluan internacian kooperacion\*) inter la landoj», — ankaŭ plie »oni starigos permanentan konsilantaron por esplorigo kaj interpacigo de internaciaj malinterkonsentoj, kiuj devenos el ekonomia konkuro, pli-grandigita komerco, kreskanta popolmaso kaj el ŝanĝo de sociaj kondiĉoj».

Tiu ĉi referita rezolucio montras al la samaj vojoj, kiuj estas uzitaj en la propono, kiu estis antaŭmetita dum la skandinava (norda) packongreso en Kristiania 1912.

La celo en tiu estis atingota per internacia paceregistaro kaj pacparlamento kunlaboranta kun naciaj (regionaj) pacparlamentoj. La pacemaj virinoj kaj viroj, kiuj libervole estos pagantaj la pacimposton, havus voĉdonrajton, kaj estus elekteleblaj por konfidtaskoj, kiuj estus solvotaj per tiuj ĉi pacorganoj.

La interpopola paco koncerne al agoj kaj interesoj povos reale esti

\*) kunago.

konstruata sur la fundamento de leĝaro karakterizita kiel dinamika\*) popolarĵo, kies kutimiĝo estos agordanta kun la profito de ĉiuj partioj, kiuj kompreneble deziros kutimigi la popolarĵajn juĝojn per ĉiaj propraj landaj leĝoj kaj aŭtoritatoj.

La fakta senhelpeco de la oficiale interparlamentaj packlopodoj estas verŝintaj en ĉiujn realajn pacemulojn plene da premiganta doloro. Ili komprenos, ke la nuna ŝtatformo kaj maniero por trakti fremdlandajn aferojn ne donas al la homaro iun garantion kontraŭ milita forigo de la kulturpotencoj, kiuj estis sin postvivantoj.

La bando de naciaj registaroj, al kiu ĝis nun ĉiam estis donita la realigon de ia egalpezpolitiko, devas havi ian mandaton pli limigitan per la internacia centra pacorgano, kiu iom post iom prenos sur sin la maljunan, eksdiploman laboron de la eksterlandaj aferoj.

Dum la regado ĝis nun uzita ĉiu ŝtato estas minacata de la milito; — la persona merito, la lerteco kaj entrepreneco estis sin evoluciiginta al interŝanĝado, kiu tute ne havis fidon al la paco, sed certe oni ĉiam estis preta fari spekulaciojn en la militŝtato; — la internacia komerco, kapitalo, la apartigo de la oro, kaj de la realvaloroj nur estis ordigitaj por mongajno, amasigo de la kapitalo kaj pligrandigo de la orvaloro por la kapitalistoj. Tiuj ĉi faktaj rilatoj fine sin bazis sur la kanonpotenco.

Anstataŭ esti dubindega minacrimedo la milito kreskis al la certe trafanta damokloglavo.

Kiam la internaciaj pacparlamentoj tute sen armeoj kaj militŝiparo, nur posedantaj la potencon de iliaj grandaj monsumoj de la pacimposto kaj la simpatio de la internaciaj pacburĝoj iom post iom prenos sur sin la aranĝon pri eksterlandaj aferoj, tiam la prilaborado de la larĝaj kulturvojtoj ne estus ia monopolo de iuj bankasocioj apartenantaj al iu grandŝtato, sed tiuj ĉi vojoj estus la posedaĵoj de la homaro kaj la profito de tiu laboro povus esti uzota por la bono de la primitivaj aŭ senriĉaj popoloj apartenaj al la sfero de la interesoj.

En la rezolucioj 11, 14, 15 k.t.p. kaj ankaŭ en la rezolucio pri la kooperativa kunlaborado inter la

diversaj nacioj la kongresanoj akceptas tiujn ĉi ideojn.

Pri la *paca idealo* mi forte akcentas, ke la pacagado nur povas havi unu plej solan idealon, kies vortlaŭto estas la jena:

»La fakto, ke fremduloj havas certecon por vivo kaj posedaĵo dum sia restado en fremdlando estas bazita sur la konscio ĉe ĉiuj koncernatoj pri tio, ke la toleremo origine kaj reale havas sian radikon en tiu maniero, laŭ kiu la homoj al la Diaj naturfortoj donas la okazon formition, kion ni praktikvive nomas »Dia ameco«. Tio ĉi nun povas esti farita per la homo mem kiel perilo, ĉar en la homo kaj ne ekster tiu nur povas agi la fortoj, kiuj kaŭzos la internajn animbezonojn por fari amecon kaj toleremon.

Dume al ni diras la sperto, ke la momento, kiam infano estos spirite natura por preni sur sin tian pacidealon, alvenos nur post tre multe da jaroj post la naskiĝo, — tre ofte en longe progresinta aĝo.

Pro tio oni necese devas plilongigi la infanan edukadon por aparte maturaj popoloj. Tiu ĉi plej bone prosperos per la publika diskuto, kiu devas antaŭiri la elektojn por la naciaj pacparlamentoj kaj per la konscio pri la pago de la pacimposto pri kies uzado la pacburĝoj prave povas mendi klarigon kaj kalkuladon.

Plie oni devas bone memori, ke oni en tiu afero traktas internacian rilaton, kiu ne povas esti farata dependa de la religia kaj lerneja sistemoj de ĉiu lando. Tiuj sistemoj kompreneble laŭvole povas kunlabori kun la interpopola paclaborado, sed la fundamento devas nepre esti la vivanta pacagado mem, per kiu oni tiamaniere klarigos por la serĉantaj novicoj la pacproblemon kun ĝia propreco.

La internacia pacparlamento estus la lango sur la balancitrabo per kiu la estanteco pezos la eblecon por milito aŭ paco al la grandpolitika situacio.

Se tiu lango montras al milito kaj la esploro de la internacia pacparlamento estas montrinta la ŝtaton aŭ ŝtatojn, kiuj per ilia konduto estas sin oferintaj al la turmentagoj de milito, tiam la oportuna politiko lasu al la milito agi tiel rapide kaj forte kiel eble.

Meti la horoskopon de la interpopola paco en la signo de la ebleco tute forigi la militon rezultos nur la nulego.

La nuna milito estas montrinta,

ke Japanoj, Hindoj, Rusoj, Mongoloj, Egiptoj, Serboj, Montenegroj, Italoj, Angloj, Francoj, Marokanoj kaj Belgioj estas farintaj fortan unuigon por sufoki la politikan novon de la Germanoj, Aŭstrianoj kaj Turkoj, kaj tre ĝuste la homaro demandos, kiujn novajn formojn la homara kulturo prenos post la milito. Tial ne estas mirinde, ke la virinoj estas iom malkvietaj pri la karaktero de la homara solidareco kaj estas ankaŭ tre nature, ke ili deziras publike serĉigi la staton de sia propra solidareco.

Kiel serĉilon ilia packongreso havas signifon, kaj ĝi donas al la aŭskultantoj la sciigon, ke la interpopola paclaboro tute ne plu devas paradiri kiel maŝatatan pekokapron, kiu ne disponas iun firman centronganon, kiu povas fari el tiu esprimo juran personon, pri kies interesoj estas eble zorgi.

Sed la nova kondiĉo, ke oni devas fundamentigi la novan packonstruadon en la popolprofundo kaj krei la packulton en praktika maniero, liberigita de la influo de la reprezentantoj de la perfortregistaroj, ne estas akceptinta bonalmezuritan formon. Nek la norda postulo, ke la pacmovado devas esti karaktere spirita evoluciigo, kiu levos la homaron al pli alta matura kompreno rilate al la objektiva Dio, estas kaptita de la virinoj, kiuj pro tio dum iom da tempo devas senkviete fari marŝon sur la loko.

Sed se la virinoj povas realigi tiun novan liberigantan programon por akceli la interpopolan pacon, tiam iom post iom la malamikeco al la fremduloj ĉe la diversaj nacioj plimalgrandiĝos kaj la sobre logike pensanta homo vidos en la laboro por la interpopola paco evangelian agon por sana humaneco kaj amo. —



### Sufiĉaj kaŭzoj.

— Kio estas la kaŭzo, — oni demandis junan poeton — ke nur tiel malmultaj personoj ĉestis la duan kaj trian prezentadon de via nova dramo?

— Tio estas tre komprenebla afero — li respondis — antaŭhieraŭ la pluvo estis kulpa kaj hieraŭ la bonega vetero.

\*) dinamika = kiu rilatas al la internaj fortoj, kiuj evoluciigos la vivon kaj ŝanĝojn de la koncernata rilato.

## Ankaŭ min la sorto pelas.

En senĉesa la migrado  
Mi similas al sabler',  
Kiun vento tre facile  
Levas, portas for de l' ter'!

Jen ĝi estis en dezerto,  
Kaj ripozas jam ĉe bord'.  
Suno ĝin karesis suda,  
Jen ĝin pelas vent' al nord'...

Sed ne venas mi al celo  
En eterna la vagad'.  
Kaj ne konas mi ripozon  
En konstanta la serĉad'...

Ankaŭ min la sort' kruela  
Pelas ja de lok' al lok',  
Ĉiam min antaŭen tiras  
Ies nekonata vok'.

J. Voleviĉ.

El »La Ondo de Esperanto«.



## Krigsvarjehanda.

Att de olyckor, under vilka Europa nu lider, även haft inverkan på esperantorörelsen, är lätt att inse. Om många esperantoföreningar i en del av de krigförande länderna meddelas, att flertalet medlemmar äro i fält. Ett stort antal esperantister har tyvärr stupat (ett bevis, bland många andra, på den utbredning som det mellanfolkliga hjälpspråket uppnått). Särskilt i Frankrike synes esperantorörelsen ha råkat i en viss oreda, vartill många orsaker torde ha samverkat. Men från alla land förspörjas dock nyheter, som ge vid handen ett vår rörelse anpassat sig efter de rådande förhållandena. La Espero har redan i alla föregående nummer allt sedan krigets början meddelat ett och annat härom. Att fullständigt åskådliggöra esperantorörelsens tillstånd för närvarande, är icke möjligt för vår tidning med dess begränsade utrymme. Det är oss endast möjligt, att meddela några spridda drag av våra utländska meningsfränders verksamhet just nu.

I föregående nummer av La Espero omnämndes esperantokurserna i det belgiska interneringslägret vid Harderwijk i Holland. Liknande kurser ha hållits i interneringslägret i Zeist, under ledning av hr Frans de Backer från Antwerpen.

Av tyska esperantister i fält, såväl officerare som manskap, bära många en grön stjärna av tyg fastsydd på vänstra vapenrocksärmen.

Föreningen Kaiser-Wilhelm-Dank, som verkar genom tillhandahållande av böcker åt soldaterna i fält, har hos tyska esperantoförbundet gjort framställning om gåvor av esperantolitteratur för översändande till trupperna.

I den belgiska fältarmén finns en liten esperantoklubb, »Soldata Stelo», som vänt sig till britiska esperantoförbundet med begäran om sändning av litteratur och propagandamateriel.

## En krigsflyktning berättar.

Några böhmiska esperantister, som vid krigsutbrottet befunno sig i Paris, lyckades i början av september komma över gränsen till Spanien. En av dem berättar följande om vad som där hände:

Från och med den dag, då vi kommo in i Spanien, förbättrades vårt öde. Spanska meningsfränder (samideanoj) mottogo oss mycket vänligt, och jag saknar förmåga att uttrycka all den glädje, som vi njutit i deras krets. Först foro vi genom Barcelona — — — Därifrån kommo vi sedan till Valencia, Cordoba och Malaga. Överallt blevo vi mycket hjärtligt mottagna. I detta land, som kan tyckas vara helt och hållet främmande, funno vi många goda vänner, vilkas hjälp och råd äro ovärderliga under nuvarande svåra förhållanden. Deras bistånd är värt mera än tack, och kommer att för oss förbliva oförgätligt.

Vid ett sammanträde i esperantoklubben i Moskva berättade hr Ćudinskij från Kiev om sina intryck från kriget. Bland annat omnämndes, huru en tillfångatagen tysk officer-esperantist, tack vare Esperanto, tjänstgjort som tolk mellan krigsfångarna och ryssarna.

Många bland de tyska krigsfångarna i Verhovajskja (guvernementet Vologda) studera Esperanto, och de ryska esperantisterna kunna med lätthet meddela sig med dem.

## Ur tyska fältpostbrev.

— — — Några kamrater samt en fransk lärarinna vilja lära det internationella språket. När jag mottager de rekvirerade läroböckerna, skall jag strax börja undervisningen.

I går erhöj jag Edra tidningar och Liebesgabe-sändning, och tackar hjärtligt därför. Cigarrerna ha varit allmänt gillande, isynnerhet hos en av oss tillfångatagen rysk dragon. Han är den förste utländska esperantist som jag träffat i fält.

— — — Jag vill sluta mitt brev för i dag, men ej förglömma att jag mycket använder Esperanto även muntligen. Regelbundet besöker jag esperantisterna i D..., beklagligtvis äro de nu ganska få, och lämnar dem »gula blad»,\*) som för dem också äro krigsnyheter. Också för min tjänst har jag använt Esperanto, och har genom meningsfränderna i D... fått nöjaktiga anvisningar för att kunna skaffa allt behövt. Likaledes i L... har jag besökt esperantisterna, och i vår by har jag hos en spansk firma påträffat en fransman, vilken i ensamhet studerat vårt språk. Han kunde ej tala mycket på grund av bristande praktik, men jag har från D... skaffat tillräcklig materiel för att hjälpa honom. Han skriver regelbundet sina uppgifter, och kommer varannan dag för att få dem granskade.

— — — Möjligen intresserar det Eder, att 5 samideanoj (4 från Sachsen och 1 från Posen) nu slutit sig tillsammans här och mötas regelbundet.

Jag erkänner mottagandet av två nummer av Germana Esperantisto. Jag har läst dem, och därefter överlämnat dem till min kompanichef, som också talar vårt språk. — — —

— — — Ävenledes kan jag meddela Eder att jag påträffat esperantis-

\*) De tyska officiella krigsrapporterna på Esperanto, tryckta på gult papper.

ter här i fiendeland. I en förstad till Bryssel hade jag den lyckan att bli inkvarterad hos en lärare. Han var ännu nybörjare, men talade dock redan ganska bra. Beklagligtvis kunde jag tillbringa endast några timmar hos denne präktige man, emedan jag samma afton åter måste rycka ut till bevakningstjänst.

Senare upptäckte jag vid stranden i M... ett hus med inskriften Villa Esperanto. En stor grön stjarna prälade i ett fönster. Tyvärr var huset, liksom så många andra, övergivet av innebyggarna.

— — — Genom Esperanto har jag lättare än mina kamrater gjort mig förstådd bland belgier och fransmän.

I T... träffade jag en esperantist. Av en slump gick jag in i en bokhandel för att köpa en karta. Bokhandlaren tilltalade mig genast på Esperanto. — — —

En mängd sådana utdrag skulle ytterligare kunna anföras. Många av dessa brev äro i all sin korthet mycket betecknande såväl för sina avsändare, som ock för den hängivenhet, som de tyska esperantisterna även nu i fält bevara för vår sak. Man kan tycka sig se den tyske löjtnanten, som i all gemytlighet ger en esperantokurs för en sergeant och för sin kalfaktor, eller den ungerska plutonchefen med sina 10 kursdeltagare. Gefreiter Sohrman fr. Weinböhl, känd även bland svenska esperantister efter sin resa i vårt land för några år sedan, skriver från Polen att han saknar undervisningsmateriel. »Om ni ville sända några exemplar av 'Esperanto på ett blad', skulle jag bliva Eder mycket tacksam.»

En tysk reservofficer, krigsfånge i Ryssland, möttes i Moskva av en angenäm överraskning vid sin förflyttning till Sibirien. En dam, den svenske konsulns fru, kom efter föregående förfrågan hos transportbefälhavaren fram emot honom och sade: »Ni är herr — — — från Gera. Se här får ni en päls och varma pälsstöylar. Ni kommer nog att behöva dem i det kalla Sibirien.»

Orsaken till denna vänlighet? En av medlemmarna av esperantoföreningen i Gera hade fått kännedom om hans öde och satt sig i förbindelse med vår kände samideano hr Rösel i Borås. Denne hade vänt sig till U. E. A:s ombud i Moskva, vilken i

sin tur hade vänt sig till ovannämnda fru.

En esperantoklubb finnes bland krigsfångarna i Göttingen. Esperantokurser omförmälas från flera av fånglägren i Tyskland. Så t. ex. i Erfurt, där medlemmar av esperantoklubben i Sotteville (Frankrike) befinna sig tillsammans med ryska esperantister. De korrespondera på Esperanto med klubben i Sotteville (Esperanto är av den tyska censuren tillåtet som korrespondensspråk) och hava därifrån erhållit erforderliga läroböcker för kursdeltagarna.

Ur ett meddelande från Frankrike: »Vår gemensamme vän Sergeant Monbeig kom i Belgien till en flamländsk familj som ej talade franska, men som kunde Esperanto. Endast tack vare detta språk gjorde hr Monbeig sig förstådd, och kunde för sig och sina kamrater bekomma allt vad de behövde, just vid ett tillfälle då kolden var ganska stark.»



## Esperanto en Svedujo.

**Svedlingva propagandilo** estas jus eldonita de la landa Esp.-federacio. La titolo estas »Vad är Esperanto?» kaj la amplekso 4 dense presitaj paĝoj de granda oktavformato. Prezoj 10 öre por tri, kr. 1.35 por cent, kr. 6.— por kvincent, kr. 10.— por mil ekzempleroj, afranke. Mendebla ĉe Sveda Esperanto-Federacio, Gävle.

### Malmö.

»Malmö Esperantoförening» rekomenis sian agadon la 15an de septembro per Esperantovespero en la sidejo de la kontorista societo. La prezidanto de tiu societo bonvensalutis la ĉeestantojn, el kiuj la pli granda nombro konsistis el kontoraj kaj vendejaj komizoj. Poste la sekretario de la Esperantosocieto parolis pri la esenco de la esperantismo, kaj kelke da junulinoj prezentis la malgrandan unuaktaĵon »Ein Stündchens Esperanto». La agrablan kunvenon finis la prezidanto, esprimante la esperon, ke Esperantokurso estu baldaŭ aranĝota.

La sekvintan vesperon la Esperantosocieto mem komencis en la ordinara sidejo siajn kursojn. Je la 7a horo okazis la unua lekcio por

nova klaso el la plialta anaro de popola lernejo, kies instruado estas senpaga, kaj je la 8a h. komencis la laboro je kurso por la ĝenerala publiko. La societo en Malmö multe esperas. J. P.

### Norrköping.

Esperantoföreningen »La Esperanta Stelo» komencis sian laboron de la sezono mardon la 28 de septembro en kafejo »National», kie la klubo nuntempe havos siajn kunsideojn. La kunveno komencis 8,15 p. m. per parolado de la prezidanto s-ro Anton Östling, kiu salutis ĉiujn ĉeestantojn kore bonvenintaj. Poste kelkaj demandoj pri la laboro de la klubo en la venonta laborjaro estis objekto por interparolado. Kursestro fariĝis s-ro Östling. Poste oni trinkis kafon, dum fraŭlino Karin Karlsson ludis fortepianon, kiel ŝi ĉiam faris en servo de Esperanto. Fine la prezidanto admonis al laboro por nia kara lingvo kaj finis per kvarfoja vivkrio por esperanto. Ant. Östling.

### Skutskär.

Esperantoklubo estas fondita en Skutskär la 26an de septembro post parolado de S-ro Adamson el Gävle. Kiel estraron oni elektis: S:ron O. Magnusson, prez., J. Landberg, sekr., K. Hammarström, kasisto, V. Lundgren, viceprez. kaj F. Forsberg, viceprez. kune kun E. Zetterberg, supleanto.



**G. Charakopos** †. Greka samideano Gerassimos Charakopos mortis dum fervoja vojaĝo en Svedujo la 29-an de septembro. Li estis sola en sia vagonfako, kaj matene la konduktoro trovis lian korpon senvivan sur la planko.

Charakopos naskiĝis sur Korfu, kaj havis nun 42 jarojn. Esperanton li lernis en Ateno antaŭ 12 jaroj. Loĝinte en Bremen dum kelke da jaroj, li ĉe la militkomenciĝo estis elkondukata el Germanujo kune kun ruslandanoj. Pro tio vojaĝante tra Svedujo Ruslandon, li unutage gastis esperantiston en Gävle atendante la ŝipforiron al Raumo en Finnlando. Post kelktempa restado en Moskva, li loĝiĝis fine en Rostov-ĉe-Don. Nun ĉe sia morto li faris pornegocan vojaĝon al Holando, kvankam lia farto estis tre maltrankviliga jam antaŭ la ekvojaĝo.

Ripozu en paco!

## Libroj kaj gazetoj.

**Nova Sento**, filozofia romano de Tagulo. British Esperanto Association, 17 Hart Street, London, W. C., 1915. Sm. 0,500.

La verko estas bazita sur la kontrasto inter la terura Londono kaj la bela komunista civito Lajsiso, kies noblaj loĝantoj tute libervole prenis sur sin duhoran ĉiutagan obligatoran laboron por la komunumo, kaj pasigas la ceteran tempon per kuŝado sur silkaj kusenoj kaj simila ĝuado. La atributon »filozofia» la romano havas ĉar ĝi donas argumentojn pri la reenkorpiĝo de la animoj, kaj aliaj sociaj, higienaj kaj moralaj ideoj kaj doktrinoj. La enmiksita amrakonto estas tute akceptebla, sed espereble ne nur pro kutimo kaj antaŭjuĝo, sed ankaŭ pro normale sana sento, oni rajtas senti definitivan dubon pri la esprimita tezo, ke kvazaŭedzeco de samseksuloj estus progreso super la ambaŭseksaj interrilatoj. La diversaj temoj cetere ne estas ĉiam sukcese kombinitaj; multajn detalojn oni neniel povas konsenti. Ekzemple oni efektive ne povas kredi, ke oni en Lajsiso skribas per birdoj plumoj, ĉar en tiu medio kantubo estus nepre pli konvena, kaj se oni tie konstruas lokomotivojn, aeroplanojn kaj aŭtomobilojn, oni certe havas kapablon por fabriki ankaŭ ŝtalplumojn. Plue: ni mem alte ŝatas la verdan koloron, sed ni ne ŝatus verdinkan skribon sur verda papero (paĝo 48). Pro okulhigiena kaŭzo ni preferus kiel eble plej nigrajn literojn se la papero estas kolora. La Belo ne konsistas nur el simpleco, sed ankaŭ el praktikeco. La anglonacia koncepto pri la Belo tamen estas nuntempe en evoluado, kaj ni ne povas tie ĉi polemiki kontraŭ ĝi. La verko ankaŭ je aliaj rilatoj estas tre — eĉ tro — angla. Tie en la utopia Lajsiso oni vivadas proksimume kiel en Anglujo. Kvankam ne estas rakontite kiom oni tie ŝatas piedpilkon, ni tamen ekscias ke la junaj gesinjoroj refreŝigas sin per laŭteniso post sia obligatoria duhora laboro je kampkulturado aŭ en maŝinuzino. Anstataŭ al Derby, oni iras al aeroplana konkursejo, kaj se la cetera libertempo tedas, oni gوندolveturas en iaspeca Hyde Park, aŭskultante orkestromuzikon. Kaj la noblaj civitanoj en Lajsiso konsideras »la pli junajn fratojn» tute same kiel la plimulto el la angloj

pensas pri neanglaj homoj. Ni facile rekonas la opiniojn de la glora Rudyard Kipling, kiu ricevis Nobel-premion pro sia idealismo, kaj do devas esti prava.

Sed je unu afero la libro estas internacia. Ĝi estas verkita en *tre bona Esperanto*, kaj nur malofte oni vidas postsignojn de pensado en nacia lingvo. La esprimo *malpli varma* sur paĝo 34 supozeble estas preseraro (aŭ skriberaro) anstataŭ *pli varma*. La frazo: »kiam li parolis, tiam *ne volonte li faris gestojn*», ne estas tute klara en la kunteksto. Ni komprenas, ke li nur malofte uzis gestojn por plifortigisian parolon, sed ĉe la unua rapida legado ŝajnis, ke li faris gestojn kvankam kontraŭvole.

La aspekto de la libro estas tre agraba — la sola malbelaĵo rilatas al la supre aludita okulhigiena postulo. Nek plaĉas al ni la titolo sur la kovrilo: NÖVA SENTO, sed ni tre volonte pardonas tion al la desegnistoj, kiu cetere plenumis sian taskon des pli kontentige. La simbolaj vinjetoj tra la tuta libro estas malgrandaj artverkoj. La dika luks-papero ŝajnas nepraktika pro la altaj sendkostoj, kiujn oni postulas por poŝtaj banderoloj. La prezo mem kontraŭe estas surprizige malalta: duona spesmilo por pli ol 150 paĝoj, granda formato, en bonega kaj arta broŝurbindo. Kaj plue: kvankam ni ne povas konsenti pri la tuta enhavo, ni tamen havas la devon konstati ke la enhavo havas altan valoron. Ĝi devigas la leganton pensi pri multo da grandaj kaj gravaj problemoj, kiuj meritas seriozan atenton. La entute tre bona kaj simpla lingvo kune kun la ĉiaokaze interesa kaj parte amuza enhavo faras ke kiu ajn povos legi la libron facile kaj kun vera plezuro. La aŭtoro ĉe la fino salutas nin: »Ĝis reskribo». Ni respondu: »Dankon kaj bonan revenon».

**Lia Lasta Ŝanco.** Komedio en du aktoj de William Bayle Bernard. El la angla lingvo tradukis Gego. London, The British Esperanto Association, 1915. Prezo Sm. 0,300.

Tiu ĉi komedio estis ludita la unuan fojon en »Haymarket» Teatro en Londono la 15an de oktobro 1839. La prezentado okupas proksimume unu horon kaj dudek minutojn. La nombro de geaktoroj estas ses sinjoroj kaj kvar sinjorinoj. La scenarango povas esti relative simpla, kaj la komedio estas lud-ebila de iom spertaj diletantoj. La

ĉefa rolo devas esti ludata kun speciala rutino.

La agado estas miksaĵo de diversaj embarasoj kun iom da sentimentaleco, rekunigitaj geedzoj kaj gefianĉiĝo de junaj geamantoj, t. e. malnovmoda komedio de tia speco, kia ĉiatempe ĝojigas kaj amuzas.

La tradukinto jam per plifruaj verkoj estas konata pro facilflua kaj senafekta stilo. Plue la manuskripto de tiu ĉi verketo estis tralegata de membroj el Esperantista Literatura Asocio. Do ne konvenas, nek estas bezone, ke ni rekomendus la beletan kajeron. La proksimuma prononco de la anglaj nomoj estas montrita, sed ne de la franca vorto Victoire. Tamen nek la franca lingvo estas tiel universala, ke ĉiu esperantisto seius ĝiajn fonetikajn regulojn.

**Katalogo de japanaj komerc-ajoj.** Minoda & Ko., 84 Imazoto, Sirogane, Ŝiba, Tokio, Japanujo.

Priskurant upptagande sidenvaror, träsnitt efter målningar av moderna japanska konstnärer, dockor, knivar, konserver av olika slag, té, soja m. m. Firman lämnar på särskild förfrågan offert på konstsaker i elfenben, antikviteter, broderier, porslin och fajans, mattor m. m.



### Majstra pafo.

En N. okaze de la Sankta Hubertofesto, kelkaj ĉasistoj sidis kun siaj servistoj en drinkejo fanfaronante pri siaj herooĵoj.

Unu el ili rakontis, ke li antaŭ ne longe trafis per unu pafo vulpon tra la kapon kaj postpiedon.

La aliaj ekridis.

— »Demandu nur mian serviston, ĉu tio ne estas vero», diris la heroo; »rakontu la okazintaĵon, Rense, ĉar vi estis tie kun mi».

— »Jes,» diris Rense; »mia mastro pafis la vulpon, ĝuste kiam ĝi gratis per la postpiedo malantaŭ la orelo».

— »Sed», poste li diris al sia mastro, »ne mensogu plu tiel diŝe; mi preskaŭ ne povis kunmeti tiun trafon.»

El la flamanda lingvo.



**Dr Zamenhof** har kvarstannat i Varŝava efter tyskarnas intagande av staden, samt uppgives vara vid hälsa.

## Esperantismo.

Okaze de la angla respondo al mia artikolo »Esperantismo», mi volas ankoraŭ unufoje diri kelkajn vortojn pri tiu temo. — Mi bone scias ke D:ro Zamenhof kaj la unuaj batalantoj por Esperanto ligis kun Esperanto ankaŭ »ian internan ideon» pri paco etc. kaj ke ili en la propagando por la lingvo ekskluzive sin turnis al la sentemaj homoj, preskaŭ malatentante la ceteran publikon. Sed tio estis en la infana periodo de nia lingvo kaj — devas resti al tiu epoko. Nuntempe Esperanto estas io alia ol revo. Esperanto enpenetris en la praktikan vivon... Estus granda, granda eraro provi fiksi al Esperanto ian porpacan etiketon. Ni ne malvastigu la sencon de la internacia lingvo Esperanto, ni evitu la fatalon, ke »Esperantismo» fariĝas ia sekta movado. La forto de Esperanto kuŝas en tio (krom la internaj kvalitoj de la lingvo) ke ĝi estas — *neŭtrala*. La sankta, granda kaj grava ideo, kiun *lingvo internacia* en si enhavas, estas la eblo *povi kompreni unu la alian*, la eblo por homoj de malsamaj gentoj kaj popoloj sin reciproke kompreni. Se el tiu »interkompreniĝo» sekvus frateco kaj justeco de ĉiuj popoloj des pli bone! Tiu ideo certe povas esti tre interesa, sed ni tamen lasu la vorton »Esperantismo» daŭre esti nomo nur de simpla movado por internacia lingvo.

*Teodor Rosengren.*

Stockholm 7/9 1915.

*Postskribo de la redakcio:*

Malaj opinioj pri la ideo »Esperantismo» ekzistis de longe.

Efektive Esperanto estas nur lingvo, kaj esperantismo nediskuteble estas la movado por fari tiun bonegan lingvon aplikata por ĉiaj internaciaj rilatoj. Versajne neniu esperantisto pretendas, ke la lingvo estu uzota nur por pacifisma celo. Cetero ni ĉiuj scias, ke la oficiala pacifismo ne donis al Esperanto rimarkindan akcelon; multe da izolaj pacifistoj estas ja sinceraj anoj de la esperantismo, sed pli multaj estas indiferentaj, kaj aliaj eĉ estas niaj kontraŭuloj. Do esperantismo kaj pacifismo certe ne koincidas.

Sed ekzistas ja idealoj, kies akceladon per internacia helpa lingvo

oni esperas. Unuj, ekzemple, ŝatas Esperanton ĉar ĝi ebligas al homoj ĝenerale partoprenon en internacia komunikado, kio sen Esperanto preskaŭ estus privilegio al infanoj de bonhavaj gepatroj. Aliaj ŝatas Esperanton ĝuste ĉar oni supozas, ke ĝi efektivigos inter la nacioj pli intimajn rilatojn, kaj per tio kunfratiĝon de la popoloj. Tion oni nomis »la interna ideo».

Inter la du ekstremajoj tamen ne estas tro grava diferenco. Kiam D:ro Zamenhof en la himno »La Espero» formulis sian percepton, li certe ne pensis pri politika, diplomacia aŭ pacifista oficiala agado; kontraŭe li precipe (eble eĉ ekskluzive) aludis interrilatojn inter homoj el diversaj gentoj (sed ne la nuntempajn ŝtatajn interrilatojn).

»En Rusujo ĉiumomente homoj rekte suferas pro konfliktoj inter gentoj... Tial multaj vortoj en Esperantistaj poemoj... povas ŝajni al okcidentuloj iom trograndigaj aŭ tro utopiaj, dum por esperantistoj en Rusujo ili vere esprimis la sinceran voĉon de ilia koro.» (Edmond Privat en Historio de la lingvo Esperanto)



### Oni parolas fremdlingve.

El Malmö la gazetoj rakontas jenan versaĵnan okazon:

Sinjoro, laŭŝajne fremdlanda, eniris eminentan Malmö-restoracion. La ĉefkelnero respektoplene alrapidis al la sinjoro, kiu malzorge diris: Cherry Brandy!<sup>1)</sup>

La ĉefkelnero ĝentile aspektis surprizita, sed malaperis tuj, rapide kiel okcidenta venteto. Post proksimume du minutoj li reaperis kun mieno de viro sukcesinta plenumi neeblaĵon, kaj raportis: La »char-à-bancs»<sup>2)</sup> estas tie ĉi! — per vigla gesto montrante tra la granda fenestro.

Torentis el la fremdulo amaso da nekomprenebla fremdlingvaĵo.



### Bär Esperantostjärnan!

<sup>1)</sup> ĉerisbrando.

<sup>2)</sup> vurst (öppen vagn med sidobänkar).



## Gävle Esperantoförening

**Ordinarie månadmöte** avhålls tisdagen den 2 nov. kl. 8 e. m. å kafé D' Angleterre. Efter mötet samkväm.

Föreningens **bibliotek** är flyttat till kafé Esperanto. Böcker utlånas genom bibliotekarien, herr Örn, eller kaféinnehavaren, herr Holmstedt, extra bibliotekarie.

Läs

## Templaren

Templarordens officiella organ!

**Vaken. & Omväxlande.**

Pris pr år Kr. 2:50.

### Esperanto per korrespondens.

En korrespondenskurs i Esperanto, varigenom korrespondensmetodens alla fördelar tillämpats på Esperanto, är nu färdig. Det blir härigenom möjligt för var och en att **på lediga stunder** lära sig det internationella hjälpspråket.

Lättfattlig. Grundlig. Intressant.

Begär prospekt! Erhålles mot porto.

R. Pehrsson, 3-23, Gävle.

### Varför skall Sverige stå efter

de stora länderna i fråga om Esperantos spridning?

Rekvirera propagandabladet och visa **alla** Edra bekanta!

Pris för 3 st. 10 öre, 100 st. 1:35, 500 st. 6: — och 1000 st. 10: — allt portofritt från

**Sveda Esperanta Federacio, Gävle.**

### Rcetebla elkonstruata akvoforto

en la okcidenta Norvegujo preskaŭ unu tagvojaĝon pli norde ol Bergen, kun grundo por estonta fabrikejo apud glaci-libera haveno konvena por la plej profunda iro de la ŝipo al kajo estas montrota ĉe mia kontoro. La prezo estas por uzo tagon kaj nokton po jaro 30 — tridek — kr. skandinavaj po H. P. (75 <sup>kgm.</sup> / sek.) aŭ 40,80 kr.s. po 1000 watt'oj. La unuaj 15000 H. P. havigeblaj post 2 jaroj de la tago por subskribo de la kontrakto, kaj plie 15000, se mendotaj, post la plej proksimaj 2 jaroj.

Brynjulf J-hss Klingenberg's Patentkontoro  
Prof. Dahls Gate 18<sup>II</sup>, Kristiania, Norge.

**HERRAR**  
EKIPERA SIG BÄST OCH  
FULLSTÄNDIGAST HOS  
**Axel Lidholm**  
Drottninggatan 30 -- GEFLE

**Josef Wikströms**  
Tobakshandel  
GEVALIAPALATSET - GEFLE

**SKODON**  
Största sortiment hos  
**A. M. Zimmerman & Co**



**Kurs i Esperanto**  
båbörjad  
å lokal Högre Allmänna  
Läroverket, 2 tr. Lektions-  
tider: månd. och torsd.  
8—10 e. m. Deltagare har  
endast att erlægga medlems-  
avgiften till Gävle Espe-  
rantoförening, 3 kr., samt  
för läroböcker 1,25 kr.  
Nya deltagare mottagas  
om anmälan omedelbart  
göres å lektionstiden.  
**Gävle Esperantoförening.**

Esperantopapeterkartong, 25 ark brevpapper +  
25 kuvert, damf. 1: 50  
" do, do, herrformat 1: 65  
Esperantopiepenor, 30 öre st., 3 — kr. dussin  
(hårda eller lösa).  
Esperantoblyertspennor, 10 öre st., 1 — kr. duss.  
(hårda eller lösa).  
Allt franco.  
Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**

**Kiam** vi bezonas  
viandon, mendu  
ĉe  
**FRANS A. OLSON**  
Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

**Central- och Jernvägshotellen**  
GEFLE  
**REKOMMENDERAS!**

**C. J. LINDH**  
BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR  
S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE  
Rekommenderar sig vid behov av  
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.  
RIKSTELEFON 16 97.

Nyutkommen broschyr:  
**Världsspråksfrågan - en livsfråga**  
av Einar Adamson.  
Pris 25 öre. Rabatt då minst 10 ex. rek.v.  
Rekv. från **Gävle Bokförlag, Gävle.**

**Wickmans Kappaffär**  
NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE  
Vid Rådhusplanaden.  
**Kappor o. Promenaddräkter** i stort urval.  
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.  
**RIKSTELEFON 1391.**

**Gust. Holms Förstoringsanstalt**  
Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 16 28.  
Faras pligrandigojn laŭ fotografafoj.  
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

**N. Lundgren**  
GEFLE - Interurba tel. 151  
**Kamentuboj por fabrikoj.**  
Pli ol 800 konstruitaj.  
Riparoj dum uzado.  
Fulmkonduktiloj estas konstruitaj.  
Propra brikejo en Upsala.  
Plej granda firmo por konstruo de  
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.  
Argenta medalo en Stockholm 1897  
" " " Gefle 1901  
" " " Norrköping 1906

**E. Liljemarks**  
Cigarr- och Tobakshandel  
S. Centralgatan 28 och S. Kungsgatan 26  
**rekommenderas!**  
Prima varor till billigaste priser.

**"LA ESPERO"**  
Gamla årgångar av La Espero (år 1913  
och 1914) finnas i ett begränsat antal och säl-  
jas till ett pris av 1 kr. pr st. Varje esperan-  
toförening ävensom varje intresserad espe-  
rantist bör äga dessa.  
Lösnummer av tidningen kunna för  
spridning i propagandasyfte erhållas gratis  
av intresserade.  
Tillskriv **La Esperos expedition, Gävle.**

**MEST NÖJDA BLIVA NI MED  
ETT BESÖK Å**  
**Café "Esperanto"**  
DROTTNINGGATAN 29 - GÄVLE  
Rikstelefon 201  
Inneh.: C. G. Holmstedt.

**ESPERANTISTER!**  
*Köp och drick den verkligt goda njut-  
nings- och sällskapsdrycken*  
**ESPERANTO PUNÇO**  
Alkoholfri.  
REKV. FRÅN ANTON ÖSTLING,  
Styrmansgatan 36, NORRKÖPING.

**Carl Larssons**  
FOTOGRAFATELIER  
NYGATAN 34  
**Rekommenderas!**  
TELEFON 357

Från "La Esperos" Expedition, Gefle,  
kan rekvireras utkommen litteratur m. m.  
Å lager finnas **Läroböcker:**  
Lärobok i Esperanto av  
P. Nylén..... 1: — + porto 0: 12  
Lärobok i Esperanto av  
G. H. Backman..... 1: — + » 0: 16  
Lärobok i Esperanto av  
Carl Ohlsson..... 0: 50 + » 0: 08  
(Alla med Esp.-svensk ordlista)  
Esperantospråklära av  
O. W. Hjærtstätt... 0: 40 + porto 0: 08  
Esp.-svensk ordbok av  
P. Ahlberg..... 1: 75 + » 0: 16  
Svensk-esp. ordbok av  
E. I.-son Finn..... 1: 50 + » 0: 12  
Esp.-svensk o. Svensk-  
esp. ordbok av Hjært-  
stätt..... 0: 60 + » 0: 08  
Unua Legolibro av Dr.  
Kabe..... 1: 60 + » 0: 12  
**Nova Testamento**  
(mjukt band)..... 2: 50 + » 0 30  
"La Espero" oficiala  
himno esperantista,  
med musik..... 0: 60 + » 0: 04  
D:o d:o, propagandablad 0: 05 + » 0: 04  
Sveda Kantaro, kun me-  
lodioj..... 0: 35 + » 0: 08  
Esperantista Kantaro... 0: 75 + » 0: 04  
Världsspråksfrågan - en  
livsfråga av E. Adamson 0: 25 + » 0: 04  
Esperantostjärnor..... 0: 75 + » 0: 10  
D:o, (oficiella, för med-  
lemmar av U. E. A.) 1: — + » 0: 10  
D:o, (miniatyr)..... 0: 35 + » 0: 10  
Esperantobordsflaggor 2: 40 + » 0: 30  
D:o (något enklare) 1: 75 + » 0: 30  
D:o (mindre)..... 0: 85 + » 0: 30  
Esperantoflagga..... 0: 50 + » 0: 08  
D:o (miniatyr) 0: 15 + » 0: 04  
Reklammärken, 25 st. 0: 45 + » 0: 04